

# La Flamo de Esperanto

4-a de decembro 2024, numero 6

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova



## Omaĝo al Claude Gacond

Omaĝo al Claude Gacond, forpasinta preskaŭ tuj antaŭ la VK, la 17-an de novembro, estis verŝajne la plej kortuŝa aranĝo de la kongreso. Provante rakonti pri Claude, pri lia biografio kaj lia laboro, ĉiuj kontribuantoj tre baldaŭ ekrakontis pri siaj propraj rememoroj, pitoreskaj, amuzaj, belaj – kaj la parolado fluis admirinde sincere kune kun larmoj ankaŭ rimarkinde fluantaj.



La omaĝon gvidis Mireille Grosjean. El la biografaj momentoj tre ĉarme ŝi rakontis, kiel dum sufiĉe longa tempo tiam juna Claude estis en kontakto kun Edmond Privat, ili promenis ĝis la universitato laŭ bordo de la lago, ankaŭ li akompanis Privat, kiu tiam estis sufiĉe granda kaj peza, helpante lin grimpi tramon. Ili multe parolis kaj Claude rememoris poste “Tiu kontakto estis mia universitato”.

Mireille rakontis pri Claude kiel pri la homo, kiu dediĉis la tutan sian vivon, energion, kapablojn al laboro, kaj ankaŭ estis akurata kiel horloĝo. Iomgrade dank’ al li Mireille esperantistiĝis. Ŝi eksciis pri Esperanto dum vizito en Japanion, poste, jam en Svislando, vidis la priesperantan ekspozicion kaj decidis viziti CDELI, kie tuj renkontis unu aktiviston, kiu plezure trovis por ŝi en arkivo iom da materialoj pri Japanio. Tio estis Claude. Tiam ŝi certiĝis, ke lernos Esperanton.

Unu el la partoprenantoj de la omaĝo, Jerzy Dryja, memoras Claude kiel ĵurnaliston de Svisa radio Internacia, kiun Jerzy (kaj multaj aliaj) aŭskultis de okdekaj jaroj ĝis komenco de la naŭdekaj, kiam la radio ĉesis elsendadon en Esperanto. Claude gvidis la elsendojn kun sia edzino Andrée Gacond. Iliaj elsendoj estis nur primovadaj, kaj ili restas gravega dokumento pri la tia-

ma movado. Granda parto da ili estas atingebla rete, ĉe retpaĝo de Claude: <http://www.esperanto-gacond.ch>.

Sekvis kortuŝa rememoro de Mireille pri tio, kiam ĝuste el tiuj elsendoj ŝi eksciis pri falo de la Berlina muro. Ŝi estis ĉe internacia aranĝo, anoncis tiun novaĵon, ĉeestantaj germanoj ne kredis, trovis aliajn elsendojn, ekkuris telefoni al parencoj kaj gratuli... Estis ege kortuŝa momento.

Poste parolis Roy McCoy. Li priskribis Claude kiel homon, kiu ĉiam ĝojis. Roy diris, ke oni ne funebru pri homoj kiuj travivis tiom longan, ĝojan kaj sukcesan vivon, plenan da kontribuoj en bonan aferon. Estas nenio por bedaŭri. Roy rakontis, kiel dank’al Claude li eklaboris en UEA. Li venis al CDELI tiam la unuan fojon. Kaj la sekvan fojon Claude igis Roy fari katalogon de brokantaĵoj de CDELI. Li sidigis Roy ĉe tablo kaj rifuzojn ne akceptis, sed diris, ke se ĉe iu punkto Roy decidus halti kaj ion eklegi – li faru tion. Kaj li faris. Ankaŭ Roy rememoris ŝatatan sloganon de Claude “Studi matene, ferii posttagmeze”.

Mireille respondis kun rememorplena rideto, ke ĉiuj, kiuj lernis ĉe Claude, memoras anstataŭ tiu sloganon... sciuron! Temas pri tio, ke por multaj homoj estas ege malfacile prononci tiujn “sc”, kaj li ekzercigis siajn lernantojn pri tio dum laboro kun propozicioj, por ĉiuj propozicioj li uzis sciuron en/de/el arbaro. Do sciuron bonege konas ĉiuj liaj lernantoj, eĉ tiuj, kiuj neniam vidis ĝin reale. Li vidis, li entute tre ŝatis naturon kaj arbarajn promenojn.

Luiza Carol nomis Claude unu el homoj, kiujn ŝi plej admiris en la vivo. Ŝi konatiĝis kun li dank’ al kurso kun Boris Kolker. Unu el taskoj de la kurso estis “Imagu, ke vi vizitas la CDELI kaj partoprenas Kultur-an Seminarion”. Kaj Luiza, bonŝance, devis post iom da tempo viziti Svislandon, do ŝi ne imagis, sed vizitis. Kaj tie hazarde okazis ĝuste la Kultura Seminario. Claude faris eksterordinaran, kortuŝan kaj amuzan prelegon (Mireille diris, ke unufoje tiu prelego estis filmita, kaj eble oni baldaŭ trovos kaj publikigos ĝin). Estis nur du aŭskultantoj, sed li faris. Sekvan tagon Luiza kun Claude kaj lia edzino manĝis, promenis, vizitis muzeon de horloĝoj, kiu inspiris iam Andersen



verki unu el liaj fabeloj... Ili agis kvazaŭ Luiza estus ilia parenfino. Kaj estis videble laŭ ŝia parolo, ke dum tiu tago ŝi travivis miraklon, kiu lasis tre helan spuron en ŝia animo.

Katalin Kováts parolis ne multe, sed bonhumora estis ŝia parolo. Ŝi iom diris pri ellaborita de li metodologio, pri tio ke la studentoj de Budapeŝto havis eblon staĝi dank' al kunlaboro kun Claude. Ridetojn eligis ŝia frazo: "Mi lernis de li ĉion, inkluzive kuiradon kaj lavadon de littukoj".

Lasta parolis Stefano Keller. Laŭ la plano li devis paroli la unua, sed lia komputilo ne volis ŝaltiĝi. Sed ja komputilo tute pravis, ŝaltiĝante ĝustatempe, ĉar lia teksto estis kortuŝa tiom grade, ke post ĝi estus malfacile paroli por aliaj partoprenantoj. Malfacilas rerakonti ĝin, ĉar tio estas (escepte iom da biografiaĵoj) vere intimaj kaj belaj rememoroj pri jaroj tre feliĉaj, pasigitaj en amikeco kun Claude, homo "severa pri laboro, sed ludema, ŝercema en la paŭzoj". Unufoje antaŭ skiado

Claude petis skiojn, kiuj ne tre bone glitas, ja li estas komencanto. Ĉiuj ridis. Aparte Stefano parolis pri pacifismo de Claude, ke li ĉiam estis certa, ke CDELI devas resti paca porlingvista loko. Sian paroladon Stefan finis per vortoj, kiujn Claude uzis en fino de siaj leteroj: "Servoprete via". Post paŭzeto Stefan aldonis: "Sed nun mi nomiĝas Stefano Keller. Kaj li estis Claude Gacond".

\* Claude Gacond (20 aŭgusto 1931 – 17 novembro 2024), svisa esperantisto, Honora Membro de UEA, Honora Membro de Svisa Esperanto-Societo kaj Honora Membro de ILEI. Grandegan parton de sia vivo li fordonis al la laboro en CDELI. Okaze de lia 80-a naskiĝjubileo EDITION ILTIS honoris lin per fest-libro: *Instrui. Dokumenti. Organizati, Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond.*

\*\* CDELI – La Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia estas renkontiĝejo, arkivejo, explorejo kaj flegejo de la komuna kunvivo de malsamaj planlingvaj movadoj, troviĝante en La Chaux-de-Fonds, Svislando.



## Vi povas influi la ekzamendatojn en 2025

La KER-Ekzamena Komisiono de UEA ŝatus scii, kiom granda estas la intereso pri eventuala ekzameniĝo en 2025. La plenigo de tiu ĉi enketilo helpas la prepar-laborojn kaj influos la decidon pri la ekzamenlokoj kaj datoj. Antaŭdankon!

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/enketilo>

## Kantu en Esperanto

Kelkfoje dum la 5-a VK estis montrita ĉarma kaj utila prezentaĵo "Kantu en Esperanto: Ana Pula Pose". La brazila kantistino, pro kies ĉeesto en programo de la VK ni danku Rogener Pavinski, estis allogita en Esperanto-mondon per proksimaj al ŝia koro idealoj de unuiĝo kaj interpopola frateco. Ŝi samtempe lernas Esperanton kaj gitarludadon kaj decidis kunigi tiujn du ŝatokupojn. Laŭ ŝia opinio, muziko estas bonega ilo por disvastigi Esperanton kaj la kantado povas esti nemalbona lernilo.

Kadre de filmeto Ana plenumas kelkajn kantojn: "Tiel la mondo iras" de Julián Hernández Angulo, "La pluvo" (verkita de Carlos Matari, tradukita de Svena Dun), "Ĵetu rigardon sur min (malverŝajnas, mia am')" (verkita de Phil Collins, tradukita de Roberto Pigo), "Imagu" (verkita de John Lennon, tradukita de Stefo).

Ili ĉiuj estas akompanataj per oportunaj bone legeblaj subtitoloj, por ke spektantoj povu kunkanti. Des

pli, ke ŝia kantmaniero, speciale klara kaj malrapida por esti oportuna por lernantoj, plifaciligas tiun agrablancan procedon.

La komentoj sub ŝiaj programeroj estas varmaj.

**Vladimír Türk:** "Ĉio plaĉas al mi: bela knabino, agrabla voĉo kaj pura sona prilaboro!"

**Raia Androvska:** "Dankon! Agrabla filmeto! Estas bone komenci la tagon per muziko trankvile :)"

**József Eszényi:** "Mi tre ĝojas pri la Esperanta versio de la kanto Imagu (Imagine) de John Lennon! Ĝi estas mia plej amata kanto! Dankegon!"

**Raciel René Prat Primelles:** "Muziko vere helpas en la lernado de Esperanto, ĉar ĝi kunigas homojn kaj faciligas la komunikadon inter kulturoj."



# Pri Festjaro BAULDTON skize

En 1924 naskiĝis Marjorie Boulton kaj William Auld. Du grandaj homoj, samgeneraciaj, similinfluaĵ. Kadre de la prelego fare de Tim Owen estis pli-malpli detale prezentitaj biografiaj de ambaŭ kaj aparte ilia Esperanto-vivo kaj plej gravaj verkoj.

## Festjaro —BAULDTON—

William Auld (1924–2006), esperantlingva poeto, verkisto, tradukisto. Laŭ profesio li estis instruisto pri angla literaturo. Malkovris por si Esperanton el skolta regularo, estinte 13-jaraĝa knabo. Kun aliaj iamaj skoltoj eniris poste kvaropon, konatan kiel la skota skolo de esperantlingva literaturo.


Li estis Vicprezidanto de UEA (1977–1980), Prezidanto de la Akademio de Esperanto (1979–1983) kaj Prezidanto de Esperanta PEN-Centro (1999–2005); Honora Membro de UEA. Kunlaboris en multaj Esperanto-revuoj.

Lia verkaro estas diversspeca kaj abunda, kiel la plej ĉefan verkon, tradicie oni nomas *La Infana Raso*. Li verkis ankaŭ kursojn, el kiuj estas plej konata *Paŝoj al plena posedo*.

Antaŭ sia morto donacis sian grandan esperantlingvan bibliotekon al Nacia Biblioteko de Skotlando.

La unua parto de la prelego, dediĉita al William Auld, estis pli solena. La ĉefrolulo estis prezentita, kiel homo, kiu ĉiam venkis kaj ĉiam brilis. Lerneĵano, li gajnis ĉiujn sportkonkursojn, krom eble tiuj kiam kontraŭ li staris knaboj multe pli aĝaj. Junulo, post komenciĝo de la Dua mondmilito li sukcesis iĝi aviadilisto, neniam li vere militis, sed faris alian utilan laboron – spi-

onan fotadon de aviadilo. Poste li dum tuta sia vivo brilis en Esperantujo, iĝis sola esperantisto, proponita kiel kandidato al Nobel-Premio (eĉ tri fojojn, en la jaroj 1999, 2004, 2006). Kadre de la prelego sonis registraĵo, sur kiu William legas propran poeziaĵon, kaj kontraŭ ĉiuj legendoj pri nekapablo de poetoj bone legi proprajn versojn, William legas bri-




le, kiel bona aktoro.

Marjorie Boulton (1924–2017), verkistino kaj poetino, verkinta kaj en la angla kaj en Esperanto, studis anglalingvan literaturon en Oksfordo, laboris kiel la estro de la altlernejo. En 1971 doktoriĝis.

Esperantistiĝis en la jaro 1949. Ŝi estas unu el la plej vaste konataj Esperanto-aŭtoroj. En 1967 ŝi estis elektita membro de la Akademio de Esperanto. Ŝi estis Honora Membro de UEA, prezidantino de Kat-amikaro kaj ODES (Oksforda Esperanto-klubo). Ŝia verkaro estis vasta kaj diversĝenra, ankaŭ ŝi brilis kiel tradukisto. Unika trajto de ŝia verkaro estas sincero, bona humursento, sentima montrado de siaj emocioj. Ŝia kompleta poezia verkaro estas eldonita en *Unu animo homa*, duvoluma poemaro, eldonita de Esperanto-Asocio de Britio.


La dua parto de la prelego, dediĉita al Marjorie Boulton, estis pli kortuŝa. Tim prezentis Marjorie kiel virinon, kiu ne havis tro feliĉan vivon, sed havis grandan varman koron. Sian infanaĝon ŝi ne ŝatis. Ŝia vivo komenciĝis nur kiam ŝi ekstudis en Oksfordo. Inter la komentoj sub la prelego estis tiu citaĵo (sendita de Brian Moon): “Ĉu vere estis vivo antaŭ Somerville?” – el eseeto de Marjorie pri sia frua vivo. En sia intima vivo ŝi ĉiam estis iom soleca,





rie kaj ŝajne ankaŭ la preleganto ^\_^.


malgraŭ vasta populareco en Esperantujo. Tre kaptis atenton la pripenso, ke kadre de ŝia vasta korespondado, ŝi kvazaŭ penis donaci al aliaj homoj, kiuj havis malpli da ĉio, ĉiom, kiom havis ŝi mem. Kaj apartan lokon en la prelego okupis temo de katoj, kiun tiel amis Marjorie



**La plej konataj rondeloj en Esperanto estas la Rimleteroj, serio de 84 leteroj en la formo de rondeloj inter William Auld kaj Marjorie Boulton pri filozofiaj temoj, verkita inter 1953 kaj 1954:**



En la tria parto de la prelego estis prezentitaj atingoj kaj planoj pri eldonado de verkoj de William Auld kaj Marjorie Boulton (fare de Esperanto-Asocio de Britio), inter kiuj estis interalie pri-kata libro. Ankaŭ Tim rakontis pri festado omaĝe al du tiuj grandaj homoj. Ĉi-jare pasis serio da diversaj festadoj, dediĉitaj al ili (pri parto de ili legu en la revuo *Esperanto* n-ro 7-8, 2024). Estis aparte menciita la omaĝo dum la 104-a Brita Kongreso de Esperanto, kie la ĉefa preleganto estis Humphrey Tonkin, Honora Prezidanto de UEA kaj homo kies persona amikeco kun Marjorie Boulton komenciĝis antaŭ pli ol 70 jaroj.



gvidis la eventon kiun partoprenis dudeko da esperantistoj.

Omaĝo dum la 104-a Brita Kongreso de Esperanto. Postkongrese, mardon, la 7-an de majo, okazis ceremonio omaĝe al Marjorie Boulton, kiu ĝuste tiun tagon estus festanta sian 100-an naskiĝdatrevenon. Tim Owen



Omaĝo dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo. La deklamado dum la omaĝo estis teatreca. Oni deklamis elektitajn pecojn el la *Rimleteroj*, rondeloj kaj samtempe leteroj per kiuj interŝanĝis William kaj Marjorie. Aŭtoro de la ideo estas Michela Lipari.



Speciale dediĉita al la omaĝo seminario (La Sepa Seminario de E-Legado), okazigita de la grupo de libro-legado sub la ĉina sekcio de ILEI. S-ro Hu Gupeng (Ardo) faris prelegon pri vivoj kaj verkoj de William kaj Marjorie kaj pri iliaj rilatoj kun ĉinaj esperantistoj, kiujn ili kuraĝigis tadaki kaj verki. Estis ankaŭ aliaj programeroj, dediĉitaj al la temo.